

Heinrich Heine,  
Teksista kanto

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Ĉe siaj teksiloj la dentojn grincante  
Sidadas teksistoj jen, ne plorante:  
Ni teksas trioblan malbenon por vi  
En vian morttukon, Germani'.  
Ni teksas, ni teksas!

Malbenon al tiu ĉi surda Dio,  
Infane ni kredis je la religio.  
Ja vane esperis, atendis ni,  
Simiumis kaj mistifikis nin Li.  
Ni teksas, ni teksas!

Malbenon al tiu fireĝ' de l' riĉuloj,  
Kiu ne kompatis je ni mizeruloj,  
Ĉantaĝas la lastajn groŝojn el ni,  
Kiel hundojn nin pafmortigigas li.  
Ni teksas, ni teksas!

Malbenon al tiu ĉi falsa patrio,  
Kie nur prosperas la koterio,  
Kie estas rompata ĉiu juna flor',<sup>3</sup>  
Kie regas de l' putro la odor' -  
Ni teksas, ni teksas!

Navedo flugas kaj krakas teksil',  
Ni teksas senlace dum nokta trankvil' -  
Morttukon ni teksas, Germanujo, por vi,<sup>4</sup>  
Enteksas trioblan malbenon ni,  
Ni teksas, ni teksas!

...

Heinrich Heine,  
Teksista kanto

*tradukita de Alfred Conzeth*

Nenia larmeto en sombraj okuloj,  
Jen sidas teksistoj, mizeraj povruloj;  
Germana Praregno, mort-tukon ni teksas,  
Kaj en ĝin trioblan malbenon ni plektas.  
Ni teksas, ni teksas!

Malbenon al Dio, la blinda, la surda,  
Al kiu ni preĝis en kredo absurda.  
Ni vane esperis, ni vane predikis -  
Li trompis simie, nin eĉ mistifikis.  
Ni teksas, ni teksas!

Malbenon al Reĝo, al reĝ' de riĉuloj,  
Ne vidas suferon de ni mizeruloj,  
Li premas el ni ja la lastan et-pundon  
Kaj lasas mortigi nin kiel fi-hundon.  
Ni teksas, ni teksas!

Malbenon al nia Patrujo maljusta,  
Jen kie prosperas nur trompo embuska,  
Jen kie ĉe putro nur morta kaduko;  
Germana Praregno, jen via mort-tuko!  
Ni teksas, ni teksas!

...

---

<sup>3</sup>aŭ: Kie frue rompatas ĉiu flor',

<sup>4</sup>aŭ: Morttukon, ni teksas por vi, Germani',  
Trioblan malbenon enteksas ni.

*Traduko de la Germana poemo “Die schlesischen Weber” de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04).*

*Arg-243-491 (2005-11-20 18:13:42)*

*Esperantigita de Manfredo Ratislavo (Manfred Retzlaff) en 2001-04-08 laŭ la germanalingva teksto, kiu post la publikigo de la unua versio en la revuo “Vorwärts!” (= “Antaŭen!”), eldonita de germanaj fuĝintoj, estis diskonigita en Germanio sur flugfolioj. En tiu flugfolia versio la poemo havis la titolon “Weberlied” (= “Teksista kanto”). [Laŭ interreta informo de l’ 27.05.04 de la Instituto Heinrich Heine, Düsseldorf, s-ino Marianne Tilch.]*

*Traduko de la Germana poemo “Die schlesischen Weber” de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de ALFRED CONZETH (\*1913-12-08 – †1998-05-16).*

*Arg-243-492 (2004-06-02 21:43:47)*

*Alfred Conzeth vivis en Mettmann ĉe la germana urbo Düsseldorf. Li estis profesia presisisto kaj korektisto ĉe la eldonejo Droste en Düsseldorf. Li mem eldonis Esperanto-broŝurojn kaj diversajn tradukojn kaj tradukis ankaŭ mem. Li estis dum multaj jaroj la eldonisto de la informilo de la Esperanto-Societo de Düsseldorf, la “Radsaltanto”. [Laŭ informo el la libro “Esperanto - ein Ausweg aus Babylon? 95 Jahre Esperanto in Düsseldorf”, eldonita en 2002 de Edeltraud kaj Max Hans-Jürgen Mattusch kunlabore kun la Esperanto-Societo Düsseldorf]*